

第 5 期  
2019-06

# 黄河 Flava Rivero

Duonjara Revuo

茵梦湖

Kvar Antikvaj Poemoj

Iom pri Finnioj



河南世界语者联盟  
Henan-a Esperantista Grupo

## 目录 Enhavo

- |    |                                |                     |
|----|--------------------------------|---------------------|
| 3  | 茵梦湖                            | 孔雷 译                |
| 11 | Kvar Antikvaj Poemoj           | trad. Xiong Linping |
| 16 | Nankino en Songô               | Zhuang Qixiong      |
| 17 | Al Mia Filo                    | Gajo                |
| 18 | Iom pri Finnj                  | Mirja Perunka       |
| 21 | Koko kaj kokino iris sin bani  | Vilho Setälä        |
| 24 | Prunti bovon                   | trad. Guozhu        |
| 25 | Anonimaj Spritaĵoj             | Anonimo             |
| 26 | Ami, ŝati, plaĉi, preferi 词义辨析 | 王崇芳                 |
| 28 | 河南世界语运动纪事 (续)                  |                     |
| 32 | 世运短波                           | 贾荣霞等                |

封面: La Fenestro, en la Parko de Floroj, Xinyang

Foto: Zhang Xuesong

### 编者的话

第5期《黄河》和大家见面了，转眼她已坚持三年了，这在世运沉寂的国内，已是颇为难得。网络传媒的冲击，使传统刊物日渐萎缩甚至退出，小众的世界语更是难免。然而《黄河》却逆势而为，继电子版之后，今年又正式推出了打印纸质版。没有印刷厂那样的印量要求和昂贵费用，一册起印，以尽可能低的成本来满足部分读者对纸质版的需求。这种出版方式或许不失为今天世界语刊物发展的一条途径。我们相信，这是一个有益的尝试，也希望更多的兄弟组织能借鉴这样的办刊模式，让世界语刊物重新归来！

黄河  
Flava Rivero

半年刊

2019年第1期 总第5期

主办：河南世界语者联盟

编辑：《黄河》编辑部

出版：世界语工作室

主编：张雪松

邮箱：redakcio@126.com

网址：<http://flavarivero.top>

校对：永沛 孔雷 李传华

本刊电子版可免费索取，  
纸质版每期平邮6元，挂  
号9元，快递11元。

欢迎订阅，欢迎投稿。

推荐使用微信支付



# Imenlago 茵梦湖

原著：斯托姆 世译：巴德 汉译：孔雷

Denove jaroj preteriris. — Sur ombra arbarvojo, kiu kondukis malsupren, juna viro kun forta, brunigita vizaĝo paŝis dum varma printempa posttagmezo. Per siaj seriozaj grizaj okuloj li rigardis scivole en la malproksimon, kvazaŭ li atendus fine aliĝon de la tede unuforma vojo, kiu tamen ne volis finiĝi. Jen ĉaro suprenvenis malrapide.

几年又过去了。——一个春暖的下午，阴凉的林间下坡路上走来一个强壮的黑脸青年人，他用一双严峻的灰眼睛急切地眺望着远方，仿佛他终于盼到了这条枯燥单调之路的变化，然而它并没想完结。瞧，一辆马车慢慢上来了。

—He! Bona amiko—, vokis la promenanto al la apudiranta vilaĝano, —ĉu tiu ĉi estas la ĝusta vojo al Imenlago?

“嘿，好朋友！”这个青年人向身旁走着的乡下人喊，“这条路是通向茵梦湖的吗？”

—Jes, ĉiam rekten—, respondis la viro kaj ŝovis sian rondan ĉapelon.

“是的，一直向前走。”那个乡下人推了推圆帽，答道。

—Ĉu estas ankoraŭ longa vojo ĝis tie?

“到那里还有很远的路吗？”

—La sinjoro estos baldaŭ tie. Eĉ ne duonan pipon da tabako, kaj vi venos al la lago; la mastra domo staras tute apude.

“先生，不远了，要不了半袋烟的工夫就到湖跟前了；那座庄园就在附近。”

La kamparulo preterveturis; la alia laŭlongiris pli rapide sub la arboj. Post kvaronhoru la ombro subite ĉesis maldekstre de li; la vojo kondukis al deklivo, el kiu la suproj de centjaraj kverkoj apenaŭ elstaris. Trans tiuj ĉi malkovriĝis vasta, suna pejzaĝo. Profunde sube kuŝis la lago, trankvila, malhelblua, preskaŭ ĉie ĉirkaŭata de verdaj sunlumigataj arbaroj; nur ĉe unu loko ili disiĝis kaj ebligis ĝui profundan perspektivon, ĝis ankaŭ tiu fermiĝis per blujaj montoj. Diametre, meze de la verda foliaro de l' arbaroj, io kuŝis supere kiel neĝo; ĝi estis florantaj fruktarboj, kaj el inter tiuj elstaris sur alta bordo la estrodomo, blanka kun ruĝaj brikoj. Cikonio ekflugis de la kamentubo kaj rondflugis super la akvo.

这乡下人赶着车驶过去了；那青年人沿着长长的道路在树下走得更快了。走了一刻钟后，树影从他左边突然消失了；道路通向一个斜坡，百年老橡树的树梢差不多刚刚露出坡顶；从树梢望过去，眼前呈现一片广阔、丽日的景色。下面深处有一个平静碧蓝的湖，四周几乎都被阳光普照的翠绿的树林环绕着，只有一处树木分散开了，可以从中望到深远的景色，一直看到远处的青山。从正面望去，在这树林翠绿的茂叶当中，有似雪一样白花花的一片漂浮在上面，那是一片正在开花的果树；再放眼看去，果树丛中显露出在高岸上耸立的庄主的红砖白房。一只鹤鸟从烟囱处飞起，在湖水上面盘旋。

—Imenlago!— vokis la iranto.

“茵梦湖！”这个走着的青年人喊道。

Preskaŭ ŝajnis, kvazaŭ li nun alvenis la celon de sia vojaĝo; ĉar li haltis kaj transrigardis super la pintoj de l' arboj, kiuj staris ĉe liaj piedoj, al la alia bordo, kie la spegulaĵo de l' mastra domo naĝis sur la akvo mole balanciĝanta. Tiam li subite daŭrigis sian vojaĝon.

看样子，他此刻几乎好象是到了旅行的目的地，因为他停下不走了；从脚下的树梢上方凝望着对岸，庄园漂游的倒影在水面上轻轻荡漾。看到这里，他突然又继续赶路了。

La vojo kondukis preskaŭ krute malsupren de l' monteto, tiel ke la sube starantaj arboj donis denove ombron, sed samtempe kaŝis la perspektivon sur la

lagon, kiu nur iafoje trariliris inter la malplenaĵoj de la branĉoj. Baldaŭ ĝi iris denove dolĉe supren, kaj nun malaperis dekstre kaj maldekstre la arbaro; anstataŭ ĝi densfoliaraj vinbermontetoj etendiĝis apud la vojo; ambaŭflanke staris florantaj fruktarboj, en kiuj svarme zumis abeloj. Majesta viro en bruna surtuto venis renkonte al la promenantoj. Kiam li preskaŭ atingis la alian, li svingis sian ĉapon kaj vokis per hela voĉo:

这条路从山丘几乎很陡地向下延伸，以致下面耸立的橡树又产生了阴影，同时把远景藏进了只能偶尔透过树枝的缝隙窥见的亮闪闪的湖面上。一会儿道路又缓缓向上，树林在左右两边渐渐消失；代之而在路旁伸展开的是茂密的葡萄山；两侧是正在开花的果树，果树中充满着蜜蜂嗡嗡声。一个穿着棕色外衣、相貌庄重的人来迎接这位来人。当他几乎到了他跟前时，他挥动着自己的帽子，高声呼唤：

—Bonvenon, bonvenon, frato Rejnardo! Bonvenon sur bieno Imenlago!

“莱因哈德兄弟，欢迎，欢迎！欢迎你来茵梦湖庄园！”

—Dio gardu vin, Eriĥo, kaj dankon pro via bonveno! — la alia kontraŭvokis al li.

“埃里克，上帝保佑你！谢谢你的欢迎！”莱因哈德对着他喊道。

Tiam ili kunvenis kaj premis al si reciproke la manojn.

这时，他们走到一起，互相握手。

—Ĉu ankaŭ vi estas efektive tie ĉi?— diris Eriĥo, kiam li vidis de tiel proksime la seriozan vizaĝon de sia iama kunlernanto.

“真的是你吗？”当埃里克这样近看到自己旧时同窗的严峻面孔时，他说。

—Certe mi estas tie ĉi, Eriĥo, kaj vi ankaŭ; sed vi havas eĉ pli gajan mienon, ol vi iam havis.

“当然是我，埃里克，也真是你；你可比从前快乐多了。”

Ĝoja rideto ĉe tiuj vortoj ankoraŭ pli gajigis la trajtojn de Eriĥo.

埃里克听见这句话露出了喜悦的微笑，这使他的面容显得更愉快了。

—Jes, frato Rejnardo—, li diris, ankoraŭfoje premante al tiu ĉi la manon,— ĉar de tiu tempo mi ankaŭ gajnis la grandan loton; vi ja scias ĝin.

“是的，莱因哈德兄弟。”他说，并再次握了一下老同学的手，“因为从那时起我走运了，这你肯定是知道的。”

Tiam li frotis la manojn kaj vokis plezure:

说着他搓了搓手，接着又乐滋滋地说：

—Tio estos surprizo! Kiun ŝi ne atendas, eĉ ne en eterneco!

“这将是一件令人惊讶的事！她绝不会料到，也永远想不到的！”

—Ĉu surprizo?— demandis Rejnharo. — Por kiu?

“令人惊讶？”莱因哈德问，“谁呢？”

—Por Elizabeto.

“伊丽莎白。”

—Elizabeto! Ĉu vi ne diris al ŝi pri mia vizito?

“伊丽莎白！难道你没有对她讲我要来吗？”

—Nenian vorton, frato Rejnharo; ŝi ne pensas pri vi, ankaŭ ne la patrino. Mi avertis vin tute sekrete, por ke la ĝojo estu des pli granda. Vi scias, mi ĉiam havis miajn sekretajn planojn.

“一个字都没讲，莱因哈德兄弟。她不会想到你来，她母亲也不会想到的。我完全秘密地先邀请你，为的是让大家更加欢喜。你知道，我总是爱搞些小计谋的。”

Rejnharo ekestis meditema; lia spiro videble malfaciliĝis, ju pli ili proksimiĝis al la bieno. Maldekstre de la vojo nun ankaŭ ĉesis la vinberejoj, ilin anstataŭis longa legomĝardeno, kiu atingis preskaŭ ĝis la lago. Dume la cikonio sin mallevis kaj promenadis nun grave inter la legomobedoj.

莱因哈德陷入沉思；离庄园越近，他呼吸就越困难。此刻，路的左边，葡萄园已到尽头了，接着伸展开的是长长的菜园子，它几乎延伸到了湖边。这当口儿，那只鹤鸟飞落下来，在菜园中慢慢溜达。

—He!—vokis Eriĥo, plaŭdante per la manoj, —jen la altkrura egiptano ŝtelas jam denove miajn mallongajn pizostangojn!

“嘿！”埃里克拍着手喊，“看，这长腿埃及贼又在偷我的短豌豆梗啦！”

La birdego malrapide sin levis kaj flugis sur la tegmenton de proksima konstruaĵo, kiu kuŝis ĉe l' fino de la legoma ĝardeno, kaj kies murojn kovris spaliro de suprenligitaj persiko- kaj abrikotarbaj.

那只鹤鸟慢慢飞起来，飞到菜园子尽头不远的房顶上，房子的墙壁被向上攀缘的桃与杏的树墙遮蔽了。

—Jen estas la brandfarejo—, diris Eriĥo, — mi konstruigis ĝin antaŭ du jaroj. Mia karmemora patro siaparte almetigis la ekonomiajn domojn; la loĝadomo estas

konstruita jam de mia avo. Tiamaniere oni iom post iom pligrandigas sian bienon.

“看，那就是酿酒厂。”埃里克说，“两年前我请人建起来的。我先父增添了农舍；那幢住宅还是我爷爷建造的。庄园就这样逐渐扩大了。”

Tiel parolante ili venis al vasta, libera loko, kiu ĉe la flankoj estis limigita de la kamparaj ekonomidomoj, funde per la estrodomo, ambaŭflanke kunigita kun alta ĝardenmuro; malantaŭ tiu ĉi oni vidis taksusojn. Viroj kun sun- kaj laborvarmaj vizaĝoj trairis la lokon kaj salutis la amikojn, dum Eriĥo al unu kaj al alia vokis ordonon aŭ demandon pri la taglaboro. — Poste ili atingis la domon; alta, malvarmeta vestiblo akceptis ilin, ĉe kies fino ili maldekstre eniris en iom malhelan apudkoridoron. Tie ĉi Eriĥo malfermis pordon, kaj ili iris al vasta ĝardenhalo, kiun pro la foliaro kovranta la kontraŭajn fenestrojn, jen plenigis sur ambaŭ flankoj verda duonlumo; tie du altaj, vaste malfermitaj flankpordoj lasis enfali la tutan brilon de la printempa suno kaj ebligis vidi la perspektivon de ĝardeno kun rondigitaj bedoj plenaj je floroj kaj altaj krutaj foliarmuroj apartigitaj de rekta larĝa irejo, kiu donis vidon sur la lagon kaj pli malproksimen al la kontraŭaj montoj. Kiam la amikoj eniris, la aerfluo alportis al ili torenton da bonodoro.

他们这样谈着便来到一个空阔的地方，两边以农舍为界，后面就是庄主的房子，房子两翼同高高的园墙连在一起；在这堵墙的后面可以见到紫杉。劳动了一天的人们，他们的脸被烈日晒得热乎乎的，他们走过这个空阔的地方，便向这两人问好，而埃里克不是招呼这个吩咐两句，就是呼唤那个问问一天的劳动情况。——后来，他们到了那幢住宅，一走进高大的门厅就感到十分凉爽，他们又穿过门厅往左拐，便进入了一个微暗的侧廊。埃里克在这里打开门，他们就向大花房走去；由于密集的树叶遮住了对面的窗户，所以花房的两侧充满了绿色的微光；两扇敞开着的高高的侧门也沐浴在春天的阳光里，从门口可以看见园子里的景色：长满鲜花的圆形花坛和高高直立的树墙，花坛和树墙之间隔着一条笔直的宽阔走道，沿这条路可以望见湖景和对面山上的远景。当这两个朋友走进来时，一股清馨的香味随风源源不断地飘来。

Sur teraso antaŭ la ĝardenpordo sidis blanka knabina virinfiguro. Ŝi levis sin kaj aliris al la enirantoj; sed duonvoje ŝi haltis, kiel enradikita kaj fikse rigardis la fremdulon. Ridetante li etendis al ŝi la manon.

在那花园门前的台阶上，坐着一个年轻的白衣女子。她站起来，迎着进来的人走去；半道上，她就象生了根一样，两眼凝视着那个陌生人。他微笑着



向她伸出了手。

—Rejnhardo!—ŝi vokis, — Rejnhardo! Mia Dio, vi estas tie ĉi! Dum longa tempo ni ne vidis nin.

“莱因哈德！”她呼喊道，“莱因哈德！我的天啊，是你来了呀！我们很久没见面了。”

—Longe ne—, li diris kaj povis nenion diri plu; ĉar aŭdante ŝian voĉon, li sentis en la koro delikatan korpan doloron, kaj, kiam li rigardis ŝin, ŝi staris antaŭ li, la sama gracia, karesa figuro, al kiu li antaŭ jaroj diris adiaŭ en sia patra urbo.

“很久没见了。”他支了一声，便再没有什么话可说，因为听到她的声音，他心头就感到肉体隐隐作痛。当他瞥眼看她时，眼前的她依旧是几年前在故乡分手时那样苗条而柔媚。

Eriho postrestis ĉe la pordo kun ĝoja vizaĝo.

埃里克跟在后面，呆在门边，感到十分愉快。

—Nun, Elizabeto!— li diris, — He! Tiun ĉi vi ne atendis, tiun ĉi ne en tuta eterno!

“哎，伊丽莎白！”他说，“嘿，你没料到吧，这是你万万想不到的。”

Elizabeto rigardis lin per fratinaĵoj.

伊丽莎白象妹妹一样看着他。

— Vi estas tiel bona, Eriho!— ŝi diris.

“埃里克，你真好！”她说。

Li prenis karesante ŝian mallarĝan manon en siajn.

他爱抚地把她的小手握在自己的双手里。

— Kaj tial ke ni nun havas lin—, li diris, — ni ne lasas lin tuj foriri de tie ĉi. Li estis for tiel longe; ni volas lin denove hejmiĝi. Vidu nur, kiel li havas fremdan kaj noblan mienon!

“现在，他在我们这儿了，”他说，“我们不能让他仓促离开此地。他离开家乡那么久，我们要把他重新留在家乡。瞧，他现在这样子多么象一个高雅的外乡人哪。”

Timema rigardo de Elizabeto tuŝetis la vizaĝon de Rejnhardo.

伊丽莎白羞涩的目光瞥了莱因哈德一眼。

—Tio estas nur la tempo, dum kiu ni ne estis kune—, li diris.

“这完全是我们分别太久了。”他说。



En tiu momento venis la patrino tra la pordo kun ŝlosilkorbeto ĉebrake.  
就在这会儿，伊丽莎白的母亲胳膊上捩着钥匙篮，走进门来。

—Sinjoro Werner!— ŝi diris, rigardinte Rejnardon, — jen, tiel kara, kiel ne atendita gasto.

“沃纳先生！”她瞧着莱因哈德说，“啊，亲爱的客人，真没想到。”

Kaj nun la interparolado iris de demandoj al respondoj sian ebenan vojon. La virinoj sidiĝis al siaj laboroj, kaj, dum Rejnardo ĝuis la manĝaĵojn por li preparitajn, Eriĥo ekbruligis sian marŝaŭman pipon kaj sidis fumante kaj diskutante apud Rejnardo.

于是，他们一问一答畅快地交谈起来。两个女人忙着她们自己的事情，而莱因哈德吃着给他做好的饭菜，埃里克点燃了自己的海泡石烟斗，坐在莱因哈德身旁边吸边说。

La alian tagon Rejnardo devis iri kun Eriĥo sur la kamparon, en la lupoloĝardenon, al la brandfarejo. Ĉio estis bonstata; la homoj, kiuj laboris sur la kampoj kaj apud la kaldronoj, havis ĉiuj sanajn kaj kontentajn mienojn. Tagmeze la familio kunvenis en la ĝardenhalo, kaj la tagon oni travivis pli aŭ malpli kune, laŭ la libertempo de l' mastroj. Nur la horojn antaŭ la vespermanĝo, kiel ankaŭ la unuajn de la mateno, Rejnardo restis laborante en sia ĉambro. De jaroj li kolektis, kie li povis ekhavi tiajn, la rimojn kaj kantojn ankoraŭ vivantajn en la popolo, kaj nun li komencis ordigi sian trezoron kaj se eble plimultigi per novaj notoj el la ĉirkaŭaĵo. Elizabeto estis ĉiam dolĉega kaj afabla; la ĉiam konstantan atenton de Eriĥo ŝi akceptis kun preskaŭ humila danko, kaj kelkafoje Rejnardo pensis, ke la iama gaja infano tute ne promesis tiel silentan edzinon.

第二天，莱因哈德就随埃里克到田地、啤酒花园子、酿酒作坊去。所到之处，一派好光景；在地里和酿酒锅旁干活的人们，都很健康和知足。中午，一家人在花房里会餐，他们一天在一起的时光，多少随主人的空闲而定。只有晚餐前的个把钟头，象上午的头几个小时一样，莱因哈德呆在自己屋里做事。几年来，每逢碰到还在民间流行的歌谣，他便搜集起来。现在得空他便开始整理自己的宝贝材料，如果可能的话，在四周空白处再补充些新的东西。伊丽莎白总是非常温柔和热情，埃里克对她的举动一直十分留意，而她时常带着差不多谦恭的谢意承受着这一切。莱因哈德三番五次地想，当初那样活泼的姑娘决不想成为这般沉静的妻子。

Ekde la dua tago de sia ĉeestado li kutimis fari vespere promenadon laŭlonge de la lago. La vojo preterkondukis sub la ĝardeno. Ĉe la fino de tiu ĉi, sur antaŭiĝanta bastiono, staris benko sub altaj betuloj; la patrino baptis ĝin la vesperbenko, ĉar la loko frontis kontraŭ l' okcidento kaj pro la sunsubirado estis vizitata plejmulte je tiu tempo. El promenado sur tiu ĉi vojo Rejnharo iufoje vespere revenis, kiam la pluvo surprizis lin. Li serĉis rifuĝejon sub tilio staranta ĉe l' akvo; sed baldaŭ la pezaj gutoj penetris tra la folioj. Malsekigita, kiel li estis, li sindone rezignis kaj daŭrigis malrapide sian reiron. Preskaŭ mallumiĝis; la pluvo ĉiam pli dense falis. Kiam li alproksimiĝis al tiu vesperbenko, ŝajnis al li, ke li distingas inter la briletantaj betulotrunkoj blankan figuron de virino. Ŝi staris senmove, kaj, kiel li kredis vidi, kiam li pli proksime alvenis, turnita al li, kvazaŭ ŝi atendus iun. Li konjektis, ke Elizabeto estas tie; sed kiam li plirapidis, por atingi ŝin kaj poste reveni kun ŝi domen tra l' ĝardeno, ŝi sin deturnis rapide kaj malaperis en la malhelajn flankvojojn. Li ne povis kompreni tion. Li estis preskaŭ kolera pri Elizabeto, kaj tamen li dubis, ĉu estis ŝi; sed li timis demandi ŝin pri tio; ja, li ne iris en la ĝardenhalon, nur por ke li ne vidu eble Elizabeton eniri tra la pordo de l' ĝardeno.

从他来到的第二天起，他就习惯在傍晚沿着湖边散步了。那条路就从花园下面经过。花园尽头突出的棱堡上，有一条长板凳搁在几棵高大的桦树下面；伊丽莎白的母亲给它取名“晚凳”，因为这地方面朝西方，夕阳常常于傍晚西下走访此地。一天晚上，莱因哈德在这条路上散罢步回来，突然下起了雨。他赶紧到立在水边的椴树下寻找避雨的地方；霎时大雨滴便透过树叶落下来。他被淋得透湿，索性不避雨了，又慢慢地继续往回走。天几乎黑了；雨却一个劲儿地下得更大了。当他走近那条晚凳时，他在亮闪闪的桦树干丛中看见好象有一个白衣女子的身影。她一动不动地站立着，就他更接近时可以辨别的情景看来，她面向着他，仿佛在等候什么人。他猜测是伊丽莎白在那儿；当他加快脚步欲赶到她跟前，然后同她一起穿过花园回家时，她却稍快地转过身去，消失在黑暗的旁边里了。这事他无法理解，他几乎生了伊丽莎白的怨气，然而他又疑惑是不是她；但他怕问她此事，就没有进那个花房里去，只是为了避免碰见从花园的门进来的伊丽莎白。

(《茵梦湖》全书电子版网址：<http://www.yaotaobao.info/Librejo/imenlago/>)

# Kvar Antikvaj Peomoj

elĉinigi: Xiong Linping



La boato saturita de lunlumo  
Dronas kvazaŭ en etero.  
La lazura akvo glate senondeta  
Spiras froston en aero.

Mia poezia patosemo flosas  
Ombre de la mastoj hante,  
Kaj la lirikismo drivas en la plaŭdo  
De remiloj songolande.

Tiuj surĉielaj steloj sin spegulas  
 Sur freŝverda lago sole;  
 Krias sovaĝaj anseroj en akv-herboj  
 Kontraŭ la vento gakplore.

Kelkaj ŝiplanternoj flagras ĉe l' pramejo,  
 Kiu de pratemp' ekzistas;  
 Gutas rosoj de platanoj ĉe l' rompita  
 Ponto, kiu ja persistas.

## 月夜舟中

戴复古 (1167 – 1252? )

满船明月浸虚空，  
 绿水无痕夜气冲。  
 诗思浮沉樯影里，  
 梦魂摇曳橹声中。  
 星辰冷落碧潭水，  
 鸿雁悲鸣红蓼风。  
 数点渔灯依古岸，  
 断桥垂露滴梧桐。



## Vizito al la pavilono Zongchi

**Cen Shen** (ĉ. 715 - 770)

Proksimas al la firmamento  
 De pavilono la tegmento.  
 Ĝi altas eĉ ke mi perceptas  
 Supre: la suno min akceptas.  
 Kiam serena tago brilas,  
 Ĉe-putaj arboj hele milas;  
 Se super montoj nuboj ŝvebas,  
 Tristecon tio reliefas.  
 Ĉe l' balustrado mi rigardas  
 Malsupren: Qin-monto malaltas;  
 Tra la fenestro: Wei-rivero  
 Fadene fluas sub l' etero.  
 Se mi la zenon pli ol frue  
 Ekkonus, tiam asidue  
 Mi volus iri, kor-konfida,  
 Al Budho en statu' orita.

### 登总持阁

岑参 (约 715 - 770)

高阁逼诸天，登临近日边。  
 晴开万井树，愁看五陵烟。  
 槛外低秦岭，窗中小渭川。  
 早知清静理，常愿奉金仙。

## La ombro de floroj

Su Shi (1037 – 1101)

La ombro amase ascendas sur la ŝtonperonon  
de l' bela kiosko. Ĝi estas tiel nigre densa,  
ke la servoknab' ne sukcesis — kelkfoje ordonon  
mi faris — balai ĝin for, eĉ per peno intensa.  
Apenaŭ reprenis la petolemaĵon la suno,  
Jam, neatendite, tuje ĝin resendas la luno.



### 花 影

苏轼 (1037 - 1101)

重重叠叠上瑶台，  
几度呼童扫不开。  
刚被太阳收拾去，  
却叫明月送将来。

## *Popolkanto de Changgan*

*Cui Hao (704 - 754)*



*He, sinjoro, kie hejmas vi?  
Tie ĉi en Hengtang loĝas mi.  
Ŝiphaltige, mi demandas nu:  
Ĉu samprovincanoj estus ni?*

### 长干行

崔颢 (704 - 754)

君家何处在，  
妾住在横塘。  
傍船暂借问，  
或恐是同乡。





— laŭ ĉinesko Dekses-Silabo

十六字令

Ĝoj'  
fuma sur sopira voj'  
Mi flirtis  
ĉirkaŭ verda roj'.

烟，  
不尽相思喜乐连。  
翩翩舞，  
苍翠满溪间。

Flu'  
rivera kun pluva bru'.  
Mi ĝemis  
pro soleca sku'.

江，  
东去滔滔雨打窗。  
声声叹，  
寂寞费思量。

Kor'  
sufera en songâ hor'.  
Al kiu  
pri senveka plor' ?

心，  
游子金陵梦苦吟。  
衷肠语，  
未醒诉谁听？

# *Al Mia Fílo*

Gajo



la aŭtoro

ne ploru tie!  
for de mia tombejo!  
nu, mi ne mortas!

jen, la printempa  
pluvo nutras la florojn,  
tion mi helpas.

jen, la somera  
sunlum' vigligas ĉion,  
mi en la brilo.

jen, la aŭtunaj  
ruĝaj folioj pompas,  
mi 'stas en ili.

jen, kiam vintras,  
disflugas neĝaj flokoj,  
mi 'stas neĝero.

jen, mi kun nuboj  
sur la ĉielo naĝas,  
ĉiam vin benas.

kara, ne ploru!  
for de mia tombejo!  
mi 'stas ne tie!

# IOM PRI FINNOJ

## Mirja Perunka [Finnlando]

Finnoj apartenas al eŭropaj popoloj, kaj la finna lingvo al t.n. finn-ugra grupo de ĥindo-eŭropaj lingvoj. Ekz. la hungara kaj estona lingvoj estas al ĝi parencaj, same kelkaj aliaj de malplimulto en Sovetio. Finn-ugraj popoloj ja loĝis antaŭ miloj da jaroj en larĝa regiono ek de nuna Moskvo ĝis la Arkta Oceano, ek de Balto ĝis malantaŭ Uralo. Evidente posteuloj de tiuj tie vivas daŭre, miksiĝinte, parolas ĉefe la rusan lingvon, sed povas scipovi sian pratempan gepatran lingvon.

Laŭ plej novaj arkeologiaj kaj lingvistikaj studadoj la prauloj de finnoj loĝis en nia lando, baldaŭ post la lasta glacia epoko, do ĉ. antaŭ 9000 jaroj, sed tamen malmulte, fiŝkaptante kaj ĉasante; agrikulturo komenciĝis dum la bronza epoko.

Laponoj, aŭ saame-popoloj, loĝis eble en nia lando pli frue ol finnoj, ankaŭ samtempe, dum jarmiloj. Nuntempe ili estas kelkmiloj da loĝantoj, ĉefe en norda Finnlando, sed alie en Skandinavio pli multe. Tiu lingvo apartenas la finn-ugraj lingvoj; ili havas ĉiuj civitanajn rajtojn, kaj ili agas por sia propra kulturo.

Kiel preskaŭ ĉiuj popoloj, finnoj havas en sia sango-heredaĵo genojn el aliaj popoloj, plejmulte el sudo. En la finna lingvo oni trovas praaĝajn aŭ plipostajn fremdvortojn ekz. el germaĵoj, baltaj, kaj eĉ slavaj lingvoj. Poste ni prenis multe da vortoj el la sveda lingvo. Kulturvortoj, kiuj devenas de la greka aŭ latina lingvoj, kompreneble estas abunda. Sed tamen la finna lingvo ĉefe baziĝas al sia propra karaktero. Ĉar ĝi estas fleksebla, oni povas daŭre krei novajn propralingvaj vortojn kaj esprimojn.

La skribita finna lingvo estas ĉirkaŭ 500 jaraĝa, sed neskribita praa folkloro, nun kolektite, estas nun el plej larĝaj en la mondo. La finna lingvo evoluis, fariĝis la ĉefa lingvo de la popolo, kaj oficiale, same en literaturo kaj sciencoj multflanke kulturite.



*la aŭtorino en sia somerdometo*

La vorto “finno” devenas de la nomo de iu antikva norda tribo, menciita de Tacitus (historiisto de antikva Romo). Tial ekz. svedoj nomas nin “finne” kaj la landon Finnlando. La finnlingva nomo de nia lando estas SUOMI. Ĝi estas pretermemora nomo, kaj finnoj mem uzas ĝin ĉiam, ankaŭ oficiale. Sed nia lando havas – sekve de historiaj kaŭzoj – du oficialajn lingvojn: la finnan kaj la svedan lingvojn (kvankam svedlingvaj nuntempe estas ĉ. 5% je la popolo). Tial la internacia signo de nia lando estas SF, do: Suomi-Finland.

**Esperanto:**

*Finnlando (ne ofte: Finnujo)*

*finno (ne ofte: finnano)*

*finna*

*Ĉu vi parolas finnlingve ( la finnan lingvon)?*

**Esperanto ankaŭ:***Suomio**suomo**suoma**Ĉu vi parolas suomlingve (la suoman lingvon)?***Finnlingve:***Suomi**suomalainen**suomalainen**pŭutko suomen kieltä (pŭutko suomea)?*

La nomo Finnlando estas aprobita en Esperanto. Finnaj esperantistoj tial kutime uzas ĝin, ĉar ne estas certe, se oni en iu fora lando konas la nomon Suomi. Tamen ni povas aldoni al nian adreson la vorton Suomi.

Finnlando apartenis ĉ. ek de 1300a jarcento ĝis la komenco de la 1800a jc. al Svedujo, dum la 1800a jc. al Rusujo kiel aŭtonomio. Ek de 1917a jaro Finnlando estas memstara respubliko. Nia lando preferas bonajn rilatojn al ĉiuj aliaj landoj.

Ĉar ni estas sufiĉe malgranda nacio, nur 5 milionoj da loĝantoj, ni devas lerni multe da aliaj lingvoj, En lernejo oni laŭleĝe lernas gepatran lingvon, sed ankaŭ t.n. "la duan enlandan lingvon", do: finnlingvaj la svedan, svedlingvaj la finnan lingvon. Kiel fremdaj lingvoj oni povas elekti la germanan, la francan, la rusan kaj kelkajn aliajn lingvojn. Sed la junularo nuntempe preferas la anglan lingvon, por povi vojaĝi en okcidentaj landoj, por havigi eble bonan profesion, kaj pro la larĝa havebla literaturo.

Esperanto-movado komenciĝis en nia lando dum la plej unuaj jardekoj de nun pasanta jarcento (eĉ pli frue!). Nia revuo, Esperanta Finnlando, statistikis en sia n-ro 1/1986: membroj de Esperanta Asocio de Finnlando estis 698. Sed multaj legas Esperanton, sen aliĝo en la EAF-n. Aperas iom da esperantolingvaj lernolibroj kaj aliaj presaĵoj, oni organizas somere kursojn, kaj multe da finnoj partoprenas kunvenojn kaj kongresojn. Oni povas libere, sed plejmulte proprakoste, agi pro la progreso de Esperanto. (skribita en 1986)

## Vilho Setälä [Finlando]

## Koko kaj kokino iris sin bani ②




Kokino iris al porko:

“Bona porko, bela porko,  
donu al mi harojn!  
Ŝuist’ bezonas harojn,  
li donos al mi ŝuojn,  
al knabin’ mi ŝuojn,  
ŝi donos al mi laĉojn,  
ilin mi al viro,  
li donacos kuvon,  
mi ĝin al la puto,  
la puto donos la akvon.”  
“Mi ne donas, se vi volas,  
donu vi farunon.”



Kokin’ al la muelilon:

“Muelilo, bona, bela,  
donu tuj farunon!  
Farunon pork’ ricevos,  
ĝi donos al mi harojn,  
ŝuist’ bezonas harojn  
li donos al mi ŝuojn,  
al knabin’ mi ŝuojn.  
ŝi donos al mi laĉojn,  
ilin mi al viro,



li donacos kuvon,  
 mi ĝin al la puto,  
 la puto donos la akvon.”  
 “Mi ne donas, mi ne donas,  
 se vi ne donas grenon.”



Kokino al la stalo:  
 “Bona stalo, bela stalo,  
 donu al mi sterkon!  
 La sterkon mi al kampo,  
 la kampo donos grenon,  
 mi ĝin al la muelilo,  
 ĝi donos la farunon,  
 farunon pork’ ricevos,  
 ĝi donos al mi harojn,  
 ŝuist’ bezonas harojn,

Kokino al la kampo:  
 “Bona kampo, bela kampo,  
 donu al mi grenon!  
 mi ĝin al muelilo,  
 ĝi donos la farunon,  
 farunon pork’ ricevos,  
 ĝi donos al mi harojn,  
 ŝuist’ bezonas harojn,  
 li donos al mi ŝuojn,  
 al knabin’ mi ŝuojn,  
 ŝi donos al mi laĉojn,  
 ilin mi al viro,  
 li donacos kuvon,  
 mi ĝin al la puto,  
 la puto donos akvon.”  
 “Mi ne donos, mi ne donos,  
 se vi ne donos sterkon.”



li donos al mi ŝuojn,  
 al knabin' mi ŝuojn,  
 ŝi donos al mi laĉojn,  
 ilin mi al viro,  
 li donacos kuvon,  
 mi ĝin al la puto,  
 la puto donos akvon.”  
 “Mi ne donos, se vi volas,  
 donu pinbranĉetojn.”



Kokino al la pino:  
 “Bona pino, bela pino,  
 donu do branĉetojn!  
 Branĉetojn mi al stalo,  
 la stalo donos sterkon,  
 la sterko mi al kampo,”  
 la kampo donos grenon,  
 mi ĝin al la muelilo,  
 ĝi donos la farunon,  
 farunon pork' ricevos,  
 ĝi donos al mi harojn,  
 ŝuist' bezonas harojn,  
 li donos al mi ŝuojn,  
 al knabin' mi ŝuojn,  
 ŝi donos al mi laĉojn,  
 ilin mi al viro,  
 li donacos kuvon,  
 mi ĝin al la puto,  
 la puto donos akvon.”  
 “Mi ne donos, mi ne donos,  
 ĉar hakilo mankas.”  
 (daŭrigota)

## Prunti bovon



Iu sendis leteron al riĉulo por prunti lian bovon. La riĉulo fakte ne scipovas legi kaj okaze gasto estas ĉe li. La riĉulo afekte legis la leteron kaj diris al la letersendinto: "Bone, mi scias. Post momento mi venos persone."

(trad. **Guozhu** el *Humuraĵa Antologio*)

## Anonimaj Spritaĵoj

La knabo senkonsole ploradis. Bona sinjorino kompateme proksimiĝis kaj demandis:

- Kial vi ploras, etulo?
- Ĉar mia kara instruisto ... kiu estis tiel malsana ...
- Mi komprenas ... , la kompatindulo ĵus mortis.
- Ne, sinjorino. Li resaniĝis kaj morgaŭ revenos al la lernejo.

\* \* \*

La atoma milito transformis la mondon en amason da ruinoj. El kavaĵo eliris la lasta postvivanto, kiu estis simio.

Post kelkaj tagoj, el alia kavaĵo eliris simiino.

- Ĉu vi havas iom por manĝi? demandis la simio.

Ŝi, sen diri vorton, eniris la kavaĵon kaj revenis kun pomo. Tuj kiam la simio vidis la pomon, li malakceptis ĝin.

- Ne,ne! li ekkriis. - Ni ne komencu denove la saman historion!

\* \* \*

- Sincere, mi ne scias kiel vi sukcesas fari tiom da stultaĵoj en unu sola tago.

- Nu, vidu. Mi ellitiĝas tre frue ...

\* \* \*

La granda sevda verkisto Aŭgusto Strindberg ĉiun vesperon vizitadis kafejon kie li havis rezervitan tablon.

Iutage, nekonata junulo intencis sidiĝi ĉe tiu tablo, sed la kelnero haltigis lin, dirante:

- Pardonu sinjoro, sed vi ne rajtas eksidi tie, ĉar tiu tablo estas rezervita por la verkisto Aŭgusto Strindberg.

La junulo respondis: - Kio? Ĉu mi ne rajtas sidiĝi kie sidiĝas tiu kreteno, tiu stultulo, tiu plagiatisto, tiu malsaĝulo kiu faras nenion el kopiadi!

Aŭdinte tion la kelnero apartiĝis kaj pardonpetis tiel:

- Pardonu sinjoro, mi ne sciis ke ankaŭ vi estas verkisto.

# Ami, ŝati, plaĉi, preferi 词义辨析

王崇芳

**ami** 作“爱好”、“喜欢”、“喜爱”讲时，意思是“十分乐意地使用某种东西并从中得到精神或肉体上的满足”或“十分乐意地做某事或参加某一活动从而使身心感到愉快”。ami 的宾语可以是名词，也可以是动词不定式。例如：

*Li amas teon.* 他爱喝茶。

*Ili amas sportojn.* 他们爱好体育运动。

*Ni amas labori.* 我们爱劳动。

*Ŝi amas danci.* 她喜欢跳舞。

*Mi ne amas ŝerci.* 我不喜欢开玩笑。

**ŝati** 的基本意思是“对某一事物的价值或重要性有所认识并给予好评，因而非常珍爱”或“对某人有很高的评价”，可根据上下文和具体情况译成“重视”、“珍视”、“珍惜”、“器重”、“赏识”、“喜爱”、“喜欢”等。它的宾语通常由名词充当。ami 和 ŝati 的区别在于：前者着重于能得到身体和精神上的满足，后者着重于对某一美好事物的理解和鉴赏。例如：

*Mi tre alte ŝatas vian amikecon al mi.* 我非常珍视您对我的友谊。

*La infanoj ne ŝatas longan babladon.* 孩子们不喜欢长时间的闲谈。

*Nur la suferinto ŝatas feliĉon.* 只有受过苦的人才知道幸福的价值。

*Ili tre alte ŝatas liajn meritojn.* 他们对他的功绩评价很高。

*La profesoro tre forte ŝatis lin.* 教授非常器重他。

*Kiel kuracisto mi tre ŝatas gad-oleon, sed persone ĝin mi tute ne amas.*  
作为医生我很看重鳕鱼（的医用价值），但我本人对它却一点都不喜爱。

<注> 很多人由于弄不清 ami 和 ŝati 的区别，常常把 ŝati 当作 ami 使用，例如把“喜欢咖啡”、“喜欢唱歌”译成“ŝati kafon”、“ŝati kanti”。这是应该避免

的。

**plaĉi** 的意思是“讨（人）喜欢”、“使（人）喜爱”。这个动词也可以译作“喜欢”，但句法上与汉语习惯不同。例如：

*Tiu ĉi diligenta junulo plaĉas al mi.* 我喜欢这个勤奋的青年。

*Ankoraŭ neniu plaĉis al ĉiu.* (谚语) 人人都喜欢的人还未曾有过。

*Ŝi volis plaĉi al li.* 她想讨他喜欢。

*Mi eltrinkis botelon da vino, kvankam ĝi ne tre plaĉis al mi.* 我把一瓶葡萄酒都喝光了，虽然我并不很喜欢这种酒。

*Al mi ne plaĉas lin vidi.* 我不愿见到他。(不定式作主语)

*Kiel plaĉas al vi!* 随你的便吧！(无主语句)

**preferi** 的意思是“更喜欢”、“宁愿”、“宁可”。它的宾语可以是宾格名词、不定式或从句。例如：

*Mi preferas poezion.* 我更喜欢诗歌。

*Li preferas veturi tien per ŝipo.* 我宁可坐船到那里去。

*Li preferas, ke oni eldonu lian verkon pli malfrue.* 他宁可将自己的作品晚些时候出版。

“**preferi…al…**”的意思是“宁愿…而不…”、“喜欢（某物或某人）甚于喜欢（另一物或另一人）”。如果 preferi 的宾语是不定式，则比较的那部分不用 al 而用 ol 引导。例如：

*Mi preferas fiŝon al viando.* 我喜欢吃鱼而不喜欢吃肉。(请注意：介词 al 后而的名词必须用主格)

*Li preferas prozon al poezio.* 他喜欢散文甚于喜欢诗歌。

*Ŝi preferas promeni ol resti en la ĉambro.* 她喜欢散步而不喜欢呆在房间里。

*Li preferis morti ol kapitulaci.* 他宁死不投降。

## 河南世界语运动纪事 (续)

### 1983年

1月1日，清丰县世界语小组在工人文化宫举办了世界语书刊展览。同日，安阳世界语小组在人民公园举行了联欢活动。同月10日，《郑州晚报》发表了《我的爱好——世界语》（作者：夏瀚东）。下旬，油印刊物《绿塔》(Verda Pagodo)创刊，编刻者：夏瀚东。

2月27日，新乡市世界语小组成立，会上举办了世界语展览。同月下旬，《绿塔》第2期出版。自本期至第6期，《绿塔》均由孔雷编刻印。

3月，《绿塔》第3期出版。同月至10月，郑州世界语辅导站集中上课辅导35次，讲完了世界语初级课程。

4月，《绿塔》第4期出版。《绿浪》第1期（总第3期）出版。

5月1日，河南世界语者“五一”座谈会在郑州煤田地质学院召开，来自郑州、新乡、安阳、周口、温县、舞阳、义马等地的40多名代表参加了座谈会。这是河南各地世界语者首次大聚会，主要发起倡导者是郑州的夏瀚东和孔雷。同月，《绿塔》第5期出版。

6月1日，新乡绿星世界语小组纪念建组一周年。同日，郑州夏瀚东、孔雷到开封向当地的世界语者介绍了“五一”座谈情况。同月，《绿塔》第6期出版。同月15日，开封世界语小组开始活动。26日新乡师院举办世界语书刊展览，参观者达500多人次，报名要求学习的有80多人。新乡世界语小组《牧野》创刊。同月，巩县《绿浪》第2期（总第4期）出版。

7月，新乡师院世界语学习会成立。同月，新乡开办了新的世界语班。同月，《绿塔》第7期出版。老世界语者胡国柱给《绿塔》编辑人员寄赠了《绿叶》第3期，并介绍了五、六十年代郑州世运概况。同月，巩县《绿浪》第

3 期（总第 5 期）出版。同月 8 日，新乡染织厂杜福云同志设计的带有 Verda Hejmloko 秀丽的世界语字体的印花布投产。世界语油印刊物《绿乡》在新乡创刊。同月，巩县《绿浪》第 4 期（总第 6 期）出版。同月，河南有人参加安徽大学世界语函授班学习。

8 月，《绿塔》第 8 期出版。

9 月 1 日，信阳市世界语讲习班开学。同月，新乡《绿乡》第 2 期出版。清丰县世界语小组创办《Paco》（和平）世界语小刊物。同月 25 日，商丘市世界语小组在市工人俱乐部举办世界语书刊展览，参观者达 300 多人，27 日的《河南日报》头版报道了这个消息。同月，郑州河南省民盟翻译公司专科学校开办世界语班，由沙铎同志任教。

10 月，新乡《绿乡》第 3 期出版。同月 18 日，河南省世界语研究组在郑州成立，并被接纳为省语言学会团体会员。同月，卢成之、沙铎、马凤波参加了省语言学会年会。安阳举行世界语座谈会。

11 月 27 日，开封市世界语辅导站在市相国寺门前举行世界语咨询活动。同月，新乡《绿乡》第 4 期出版。

12 月 1 日，开封举办世界语班，学员有 80 多人。开学典礼在相国寺群众艺术馆举行。同月 15 日，河南省世界语研究组和省民盟翻译公司专科学校世界语班联合举行纪念柴门霍夫诞辰 124 周年活动。同日，《郑州晚报》第 4 版发表了《世界语的创始人柴门霍夫》文章（作者：沙铎、李同）。

## 1984 年

1 月 1 日，焦作市世界语小组在市图书馆举办了世界语展览。

2 月，安阳世界语小组开办世界语辅导班。新乡《绿乡》第 1 期总第 6 期出版。

3 月 15 日，黄石世界语函授班班刊（铅印）发表郑州田崴同志的文章《我画柴门霍夫像》。黄石世协出版柴门霍夫画像和明信片（作者：田崴）。



4月10日，新乡市科协举办首届世界语班。新乡《绿乡》第2期（总第7期）出版。河南有220人参加昆明社会大学刊授世界语专修班。

5月1日，郑州世界语书刊展览在市人民公园举行。洛阳世界语小组成立，约有100人参加了他们举办的世界语辅导班。

6月，新乡《绿乡》第3期（总第8期）出版。《新乡晚报》发表《没有国籍的语言——世界语》。同月，郑州青年世协筹备组成立，讨论拟定了《章程》草案。

7月5日至6日，湖北世界语者胡国柱、徐道荣在郑州短暂逗留期间到省民盟翻译公司专科学校世界语班作世界语讲演，并同郑州、安阳、新乡的同志亲切交谈。同月，省民盟一年制世界语班20名学员结业。同月9日，洛阳市世界语协会筹备组正式成立，李青、董承志等任正副组长。同月15日，鹤壁世界语小组成立。

8月17日，鹤壁世协（筹）举办首届世界语班，学员80多人，由索建春、黄龙任教。合肥8月号《学习》杂志发表郑州夏瀚东同志的文章《世界语汉语语法比较》。

9月，郑州青年世协（筹）创办《青年世界语者》（Juna Esperantisto, 16K, P20）。同月4日，开封世界语辅导站举办第2期世界语班。9日，新乡市科协第二届世界语班开学，学员140名，由王晓驹、韩道翥、朱命合任教。15日，鹤壁市世界语小组《新星》（La Nova Stelo）创刊（16K, P10）。17日，洛阳世协（筹）举办第2期世界语班。同月16日，河南世协第一次筹备工作会议在郑州市塑料研究所召开，来自郑州、洛阳、开封、周口、新乡、安阳等市的世界语小组负责人15名代表出席了筹备会。22日，安阳世界语小组创办《绿峰》（Verda Montpinto）。30日，鹤壁市世界语小组在人民公园联欢，庆祝建国35周年。同月，安阳脱黎霞赴上海外国语学院参加第4届高等院校世界语教师进修班。

10月2日，郑州和新乡两市的50多名新老世界语者在省会人民公园举行了庆祝国庆游园联欢会。5日，《新乡晚报》以“别开生面的联欢会”为题，报道了两市的联欢活动。同月15日，新乡市科协世界语班创办《Espera Hejmloko》（希望之乡）油印刊物。同月28日，洛阳市世界语协会成立，李青任理事长。《洛阳日报》（29日）、《河南日报》（31日）对此作了报道。同月，洛阳世协会刊《La Espero》（希望）创刊。同月，河南中医学院张昊光同志在省语言学会年会上宣读了自己撰写的《对人类语言前途的展望》的文章，阐述了人类需要国际语以及世界语的优越性。

11月9日至14日，全国科技世界语学术讨论会在湖北武汉召开，洛阳程建华、安阳薛新民参加了会议。11月19日，周口世界语协会筹备组成立，王琦、张锦萌任正副组长。同月，鹤壁《La Nova Stelo》（新星）第2、3期合刊出版。郑州《Juna Esperantisto》（青年世界语者）第2期出版。

12月1日，洛阳世界语协会举办世界语知识竞赛。15日，洛阳世协、郑州青年世协（筹）分别在当地举行柴门霍夫节庆祝活动。同月29日，鹤壁市世界语协会筹备组成立，彭大宗、索建春、黄龙任正副组长。《新星》第4期出版。同月，洛阳世协会刊第2期《希望》出版。

（待续）



## 鸣谢

黄银宝先生将订阅《黄河》杂志的余款8元捐赠给本刊，用于支持刊物的发展，在此谨向他表示衷心的感谢！

编辑部

## \*\*\* 世运短波

★ 1月1日，绿网论坛公布2018年十名青年世界语新秀评选结果，南阳市范骄阳、洛阳市吉逸翔当选。

★ 2月，孔雷整理修订八十年代翻译的习作《茵梦湖》，并节选部分内容在“美篇”发布。

★ 3月底，新乡世协在新乡县小吉镇的京华园举行了一次世界语宣传活动。

★ 4月，孔雷翻译的《茵梦湖》世汉对照电子书上线。

★ 4月26日下午3:00点，由新乡日报社主办、新乡市世界语协会承办的《花开富贵，美丽新乡》文艺演出在市体育中心举行，新乡市世界语协会常务副会长吕砚军，秘书长贾荣霞分别担任汉语、世界语主持，很好地宣传和应用了世界语。

★ 在“六一”儿童节的前夕5月31日下午四点，受新乡市文联的委托，新乡市世界语协会一行5人，带着李威伦教授主编的40本《现代少儿世界语》课本，前去新乡市太阳村进行慰问、讲课、演出。下图为与孩子们合影。

